

## La 13an de julio 2015

Nun en Japanio pli ol 60% de la japanoj koleras kontraŭ la politiko de la nuna reganta partio Liberala Demokratia Partio kaj la ĉefministro Abe Ŝinzoo pro 3 aferoj: grandskala konstruado de nova usona militabazo en Okinavo, la atomenergia politiko kaj la leĝaro por japana militado.

### Poemo deklamita en Okinavo

La 23an de junio okazis “Priplora ceremonio por ĉiuj militmortintoj en Okinavo” en la suda insulo Okinavo.

Japanaj militoj ĉiam okazis eksterlande ĝis la aeratakoj de la usona armeo fine de la dua mondmilito, du atombombadoj sur Hiroŝima kaj Nagasaki en aŭgusto 1945 kaj la surtera batalo en Okinavo ekde marto ĝis septembro 1945.

La batalo en Okinavo okazis la 26an de marto kaj oficiale finiĝis la 23an de junio, sed eĉ poste soldatoj batalis, envolvante loĝantojn. La nombro de mortintoj estas jena laŭ Wikipedio:

Japanaj mortintoj el ekster Okinavo:	65 908
Loĝantoj de Okinavo:	122 228
Usonaj soldatoj:	14 006



En ĉi-jara ceremonio junulo Ĉinen Masaru en la tria lernoĵaro de la supera mezlernejo de Jokacu deklamis sian poemon.

*Mirukujo ga jajura*

**“Ĉu estas paco?”**

(la okinava dialekto)

*Mirukujo ga jajura*

Kanto de antikvaj okinavanoj, kiuj esperis pacon, alvokas min.

“La epoko de milito finiĝis. Baldaŭ venos la epoko de paco, do ne ploru, niaj karaj popolanoj. Vivo estas trezoro”.

Same kiel antaŭ 70 jaroj,

ankaŭ en tiu ĉi jaro kantoj de cikadoj anoncas la finon de la pluvsezono.  
En la tago de la 70a Priplora Ceremonio de la batalo en Okinavo  
inter grandaj arboj *kuŭadiisaa* alte  
kreskanta, benate de la tero  
flugas humidaj maraj ventoj de suda  
somera solistico,  
kantoj de cikadoj delikate malaperas en  
la ventojn.



Tuŝante trunkon de *kuŭadiisaa* kaj  
aŭskultante cikadojn,

*Mirukujo ga jajura*

“Ĉu nun estas paco?” mi demandas la ventojn.

Pliagha fratino de mia avo,  
kiu amis florojn, amis dancojn kaj amis min kiel sian propran nepon,  
Pliagha fratino de mia avo,  
kiu ne reedziniĝis kaj vivis kiel vidvino dum la postmilitaj 70 jaroj,  
ŝi estas pli ol 90-jara kaj kuŝas en la lito kun la korpo kurbiĝinta.  
En 1945 dum la batalo de Okinavo, ŝi perdis sian karan edzon.  
Li sola mortis en la aĝo de 22 jaroj, postlasinte siajn edzinon kaj bebon.  
Ŝi vizitis la batalejon en la sudo kaj cenotafojn,  
serĉante lian spuron.  
Al ŝi venis unupapera dokumento anontanta lian morton,  
en la urno konservata en la familia tombo troviĝas ŝtoneto, kiun ŝi metis.

Antaŭ la 70-jariĝo de la fino de la batalo de Okinavo  
ŝi suferas pro demenco.

Antaŭ ol malaperos ŝia memoro pri sia kara edzo kaj pri la milito, kiu rabis  
de ili feliĉon, ŝi kantas,  
kvazaŭ ŝi revokus memorojn de sia edzo kaj de la milito,  
kvazaŭ ŝi atendus, ke ŝia edzo revenos kun rideto,  
en la melodio de “Soldata kanto”, kelkdek fojojn, kelkcent fojojn,  
ŝi kantadas pli kaj pli interrompate.  
Senkompate la providenco malaperigas ŝian memoron en la ventojn,  
post 70 jaroj larmoj fluas sur ŝiaj vangoj sulkitaj de ŝiaj malĝojoj.  
Se oni nomas kolombojn flugantajn en la ĉielo simboloj de paco,

ŝi rakontas pri mizero de la milito kaj pri la homa forgesemo pri la milito.

*Mirukujo ga jajura*

Mi demandas la cenotafon, sur kiu estas gravuritaj la nomo de ŝia edzo kaj la nomoj de pli ol 240 mil viktimoj,

*Mirukujo ga jajura*

Supre flugas ĉasaviadiloj, skuante foliojn de *kuŭadiisaa*,  
al la mondo de la 23a de junio mi demandas

*Mirukujo ga jajura*

Mi demandas min, kiu ne spertis teruron de la milito,  
tro peza por respondi, mi preferus flugigi la demandon en la ventojn,  
sed ni ne devas forgesi ŝian memoron, mizeron de la milito,  
ni devas transdoni ŝian malĝojon, valoron de paco.

*Mirukujo ga jajura*

Cikadoj kantu laŭte, laŭ via volo,  
*kuŭadiisaa* kresku alte, benate de la abunda sunlumo,  
antikva okinava kanto, trans la tempo, nun flugu en la tuta mondo,  
por ke la nuna tempo estu paca, kaj estu eterne pace,

*Mirukujo ga jajura*

en la maraj ventoj mi fiksas ŝian memoron en mia koro.  
kaj mi transsendu la belan pacan mondon al la estonteco.

(Fino de la poemo)

En Okinavo troviĝas multaj usonaj militbazoj, el kiuj la plej granda estas la militbazo Futenma situanta en la mezo de la loĝkvartalo. Ĝi estas tro danĝera, se okazos akcidento, do la registaro decidis kaj jam komencis konstrui anstataŭan bazon en la marbordo de Henoko en la sama insulo. Tamen la okinavanoj forte kontraŭas la planon. Dume okazis kelkaj elektoj, kiuj klare montris ilian volon rifuzi novan militbazon Henoko, sed la registaro tute ne aŭskultas la voĉon de la okinavanoj. Same kiel en Fukuŝima, la registaro senkompate forĵetas la loĝantojn por sia profito. Pro tio okazas grandaj manifestacioj. La gbuerniestro Onaga deklaras, ke li malpermesos konstruadon de la bazo, uzante ĉiujn kontraŭrimedojn, kiujn la estro povas disponi.

## La leĝaro por militado

La japana konstitucio deklaras, ke

1. Japanio ne militu
2. Por tiu celo Japanio ne posedu armeon.

Dank' al tiu konstitucio Japanio neniam militis post la dua mondmilito. Usono ĉiam volis partoprenigi Japanion al siaj militoj, sed la registaro rifuzis tion, ĉar la japana konstitucio malpermesas militon, tamen la nuna ĉefministro Abe volas ŝanĝi tiun interpreton por ebligi al la japana defendkorpuso\* la partoprenon en usonaj militoj.

\* Laŭ la konstitucio Japanio ne rajtas havi armeon, do anstatu tio ni havas defendkorpuson, kies celo estas defendi nian landon, kiam malamikaj landoj atakos nin. Ĝi similas al armeo, sed la celo estas ne militi, sed defendi, do ni nomas ĝin "defendkorpuso".

Dum la pasintaj 70 jaroj japanoj neniam mortis nek mortigis en la batalkampo, kaj dank' al la famo, ke Japanio renaskiĝis de la tragedio de la du atombomboj kaj la paca konstitucio, japanoj pace kontribuis en diversaj lokoj, kie eĉ okazas konfliktoj. Se la leĝaro por militado aprobiĝos, Japanio ne povos rifuzi la usonajn petojn pri japana partopreno en usonaj militoj. Se tio okazos, Japanio fariĝos "ordinara lando", kiu provas solvi internaciajn konfliktojn per milito samkiel Usono, kaj perdos la ĝisnunan famon. Kaj se Japanio subtenos la usonajn militojn, certe defendkorpusanoj devos batali for de Japanio, kaj sekve mortos kaj mortigos "malamikojn".



Tiu leĝigo estas la plej granda turnopunkto de Japanio, de la paca Japanio al militema Japanio, do multegaj homoj kontraŭas la ĉefministron Abe kaj okazas manifestacioj preskaŭ ĉiun tagon ĉirkaŭ la parlamentejo en Tokio kaj en diversaj lokoj en la tuta Japanio.

## La registaro provas funkciigi nukleajn reaktorojn

Hodiaŭ estas 35 gradojn varme, kaj kiam venos vera somero, daŭros same varmegaj tagoj, sed laŭ la antaŭvido de la elektraj kompanioj ne mankos elektro, kvankam nenie nun funkcias nukleaj reaktoroj en Japanio. Sen elektro el nukleaj reaktoroj la japana ekonomio glate progresas kaj neniuj problemoj okazas, tamen la registaro provas refunkciigi nukleajn reaktorojn. Ankaŭ pri tiu temo multaj japanoj estas tiel malkontentaj, ke kaj

en Tokio kaj en aliaj gubernioj daŭre okazas manifestacioj kontraŭ la registaro kaj la elektraj kompanioj.

En la 1960-aj kaj 70-aj jaroj okazis ofte grandaj manifestacioj, tamen poste la japanoj kontentis pro sia “riĉa” vivo kaj la registaro subpremis la demokratajn movadojn, do malaperis kontraŭregistaraj manifestacioj, sed nun elŝprucas diversaj problemoj, kiuj minacas/os vivon de popolanoj, do homoj ne povas esti silentaj. Multaj maljunuloj timas, ke venos epoko, kiam iliaj nepoj estos senditaj al batalkampo.

Mi bedaŭras, ke mi ne povos partopreni en la varma somera movado pro mia partopreno en la UK.

**HORI JASUO**